

PRI LA EVOLUO DE ESPERANTAJ TERMINAROJ 1)

de D-ro K. DELLIAN

La evoluo de la tekniko, de la scienco kaj de la diferencigo de la ĉiutaga profesio kausas evoluon de la lingvoj. La amplekso de la vortaroj kreskas de jaro al jaro tiel rapide, ke la eldonistoj ne povas sekvi tiun evoluon. Ni povas konstati, ke eĉ la vortaroj de „grandaj” lingvoj kiel ekz. la angla ĉiam prokrastiĝas. Kion ni diru pri la malgrandaj lingvoj, kiuj eĉ ne disponas pri fakvortaroj? Ĉu Esperanto ne apartenas al tiu lasta kategorio de lingvoj? Ĉu Esperanto vere sekvas tiun rapidan evoluon? Ni povas tion jesi kaj nei. Unuflanke la esperanta literaturo estas pli granda ol tiu de diversaj aliaj lingvoj, aliflanke mankas fakliteraturo kaj fakvortaroj kaj la nuntempa stato de la esperantaj terminaroj ne ebligas tradukon de fakartikoloj sen ke la tradukisto devas inventi specialajn terminojn ĝis nun ne ekzistantajn. La manko de esperantaj terminaroj kaj la urĝa bezono verki esperantajn fakartikolojn kaj libroj devigas la aŭtorojn krei personajn terminojn. La konsekvenco estas, ke la evoluo de la faklingvo ne estas regulita. Sed kiamaniere eviti la diskrepancon? Ni ne povas malpermesi la enkondukon de nova termino en nia literaturo. Kiam ĝi iam estas kreita kaj presita ĝi fariĝis fakto kaj la legantoj povas cerbumi ĉu ĝi estas ĝusta aŭ ne. Do ŝajnas, ke ni nur povas doni direktivojn ĝeneralajn por la aŭtoroj, kaj tiuj direktivoj devas esti bonege pripensitaj antaŭ ol ili estu disvastigitaj. Tiujn direktivojn mi volas nun pritrakti kaj diskuti por starigi skemon, kvazaŭ skeleton de la vortfarado.

Jenaj principoj difinas la taŭgecon de termino:

- 1) Internacieco
- 2) Sistematiko (entenas la evolueblecon)
- 3) Precizeco (entenas koncizecon, vortan kaj vortaran ekonomion)
- 4) Elparoleblo (entenas bonsonecon, lingvan estetikon).

1) Internacieco:

Vortoj, kiuj estas konataj kaj aplikataj de la plej granda parto el

1) Noto de la Redaktoro: Ĉi tiu artikolo jam estis kompostita. S-ro Hamming estis farinta kelkajn korektojn en la manuskripto.

Tamen, por vere bonigi la formon — ĉefe la lingvaĵon — mi devus preskaŭ tute rekompostigi ĝin. Mi nepre ne estus akceptinta la artikolon. Sed kion fari kun heredaĵo en tiu stadio? Nu — mi decidis prezenti ĝin al la legantoj, korektinte nur la komposterarojn.

La spertuloj juĝu mem. La senspertaj legantoj estas avertitaj.

Cetere vi nun povas konvinkiĝi kia simpla afero estas krei Esperantan fakan terminaron. Ja elektronaĵa maŝino povus ĝin fari, mi supozas.

Temas ja nur pri ia mekanika procedo.

Sed unu peton al la adreso de tiaj vortaristoj: bonvolu ne sendi al mi tiel faritan vortaron por recenzo.

Kaj alian peton, al la adreso de artikolverkontoj: konu vian lingvon antaŭ ol vi verkos, kaj zorge kontrolu kaj pretigu viajn manuskriptojn, kaj se eble, antaŭ ol sendi ilin al la redakcio igu kompetentulon ilin kontroli. — W. P. R.

la nacioj estas internaciaj. (Inter ili la fremdvortoj ludas grandan rolon.) Tiu-ĉi difino ne estas tute ekzakta sed sufiĉas por niaj konsideroj.

Kion ni povas diri pri la internacieco de aktualaj naciaj lingvoj? Ĉu la nombro de la lingvo-anoj fiksas la internaciecon de ilia lingvo? Nepre ne. Kiu volas aserti, ke la ĉina lingvo estas internacia? Tamen 480 milionoj parolas tiun lingvon kaj nur 75 milionoj la francan, sed la lasta estas multe pli internacia ol la unua. Do aliaj faktoroj difinas la internaciecon de iu lingvo. Jen kelkaj:

- a) Literaturo
- b) Teknika nivelo
- c) Politika influo
- d) Simpleco de la gramatiko, fonetiko, literoj.

Lingvo	Naciaj parolantoj en milionoj	Procentoj el la		
		gravaj lingvoj (689 mil.)	20 lingvoj menciitaj (1353 mil.)	monda loĝantaro (2174 mil.)
Ĉina (kun ĉiuj dialektoj) ...	482		35.7	22.2
Ĉeĥa	7		0.5	0.3
Dana	3.75		0.3	0.2
Angla	200	29.0	14.9	9.2
Esperanto	(kelkaj individuoj)			
Finna	2.75		0.2	0.1
Franca	75.0	11.0	5.5	3.5
Germana	100	14.5	7.4	4.6
Greka	7		0.5	0.3
Hungara	10.75		0.8	0.5
Itala	44	6.4	3.2	2.0
Japana	80		5.9	3.7
Nederlanda ...	12		0.9	0.5
Norvega	2.75		0.2	0.1
Pola	30		2.2	1.4
Portugala	50	7.2	3.7	2.3
Rusa	120	17.4	8.9	5.5
Hispana	100	14.5	7.4	4.6
Sveda	6		0.4	0.3
Turka	20		1.4	0.9
Ĉiuj aliaj	821			37.8
Sumo	2174	100.0	100.0	100.0

Interesa tabelo prenita el la raporto de J. H. Holmstrom pri „INTERLINGVAJ SCIENCAJ KAJ TEKNIKAJ VORTAROJ” (UNESCO/NS/SL/1) montras la evidentan rilaton inter nombro de la loĝantaro kaj la graveco de la koncerna lingvo.

El ĉi tiu tabelo estas videble, ke 7 lingvoj, nome la angla, la rusa, germana, hispana, franca portugala kaj itala estas gravaj.

La rusa kaj la ĉina lingvoj ne estas diskutindaj pro la neromanaj literoj (vidu 1 d).

Entute restas 6 lingvoj, kiuj konsistas el du familioj, el la romanida kaj la ĝermanida.

Koncerne la literaturon entute (1a) ambaŭ familioj estas same fortaj kaj oni ne povas konstati, ke unu superas la alian. Rilate al la teknika nivelo (1b) la ĝermanidaj lingvoj certe superas. Pri la politika influo (1c) ne multe povas esti dirita, ĉar ĝi ofte ŝanĝiĝas.

Do en sumo ni havas du grandajn grupojn por priparoli: la romanidan kaj la ĝermanidan.

La romanida grupo:

La romanidaj lingvoj havas la avantaĝon, ke la radikoj de la vortoj bazas sur la iama romana lingvo. Esceptoj okazas en la hispana kie la influo de maŭroj estas evidenta. La romana lingvo liveras samtempe la bazon por la nuntempaj fremdvortoj (kune kun la iama greka lingvo) kaj pro tio la fonto por internacieco estas garantiita. Kompreneble ekzistas sufiĉe da romanaj radikoj, kiu ne estas uzataj kaj antikvaj. Granda plua avantaĝo de romanidaj lingvoj estas la unusignifa fonetiko. Ĉiu vokalo kaj konsonanto havas difinitan elparolon. Pro tio la fonto romanida estas por internacia lingvo la ĉefa.

La ĝermanida grupo:

En tiu grupo ni devas distingi inter la germana kaj la angla lingvo. Ambaŭ havas la malavantaĝon, ke la ĝermanaj radikoj ne havas internacian karakteron. La germana estas fonetika, la angla tute ne. El tio sekvas, ke la angla ne taŭgas kiel fonto por internacia lingvo, same kiel parto de la germana. Tamen la angla kelkfoje servis kiel sola reprezentanto de la lingvofonto ekz.: birdo el la angla *bird*, kiu alie estas prononciata.

Kio sekvas el tiuj faktoj por la vortfarado? Unue serĉi la romanidan fonton kaj kompari ĝin kun la principojn 1-4! Se ĝi kongruas kun internacieco, sistematiko, precizeco kaj elparoleblo ni apliku ĝin, se ĝi ne kongruas serĉu germanan. Ni ekzamenu la metodon ĉe kelkaj ekzemploj.

Angla	franca	germana	hispana	itala
1) to distill	distiller	destillieren	destilar	distillare
2) cooler	condenseur réfrigérant	Kühler	refriger- ador	refrigeratore
3) irrigation	arrosage	Berieselung	riego	innaffiamento
4) spatula	spatule	Spatel	espátula	spatola

1) Internacieco: radiko *distil* kaj *destil*.

Sistematiko: (evolueblo) *destil*, ĉar *distil* entenas la prefikson *dis*,

kiu povas kaŭzi iam malfrue miskomprenon, kiam la radiko til-fariĝos memstara.

Precizeco: *destili* estas konciza kaj necesa, ne kontraŭas vortan kaj vortaran ekonomion.

Elparoleblo: la termino estas bonsona kaj elparolebla.

2) Internacieco: kondens- kaj refriger-.

Sistematiko: kondens- estas evoluebla, sed ne en la supre menciata senco (kiel malvarmigilo kemia). Do oni povas evolui: *kondens-oro*, -ilo, -atoro, -ato. Kondensatoro estas fizika aparato por koncentrigi elektron.

refriger- estas evoluebla: refriger-ator, -ilo. La radiko kondens do ne estas akceptebla. Restas refriger-.

Precizeco: la radiko refriger- estas preciza, sed kontraŭas la vortaran ekonomion. Oni povas ĝin anstataŭi per malvarmig-. La lasta esprimo ne kontraŭas la vortan ekonomion. refriger- (8 literoj) malvarmig- (9 literoj).

Elparoleblo: ĉiuj radikoj, kondens-, refriger-, malvarmig- estas belsonaj.

Konkludo: Se oni proponas la radikon refriger- oni kontraŭas la vortaran ekonomion, se oni proponas la radikon malvarmig- oni kontraŭas la internaciecon. Sed malvarmig- estas logike evoluita el varm kaj por simplaj personoj tuj komprenata. Malvarmig- estas pli larĝa, pli ĝenerala ideo ol refriger-. La lasta estas speciala radiko. Kiam oni aplikas refriger-, tiam oni nepre devas difini la sencon, dum la radiko malvarmig- ne bezonas ian difinon ol la memkompreneble gramatikan. Kiam la radiko malvarmig- ekz. en malvarmigilo sufiĉas por signifi aparaton, tiam refriger- ne necesas. La principo de la vortara ekonomio entenas samtempe la principo de la sufiĉeco. Do en ĉiuj kazoj malvarmigilo estas la *superordigita vorto* kaj refrigerilo la *speciala termino*.

3) Internacieco: Nur la angla entenas internacian radikon irigac-. La aliaj ne estas pritraktindaj.

Sistematiko: irigac- estas evoluebla ekz.: irigacilo.

Precizeco: kontraŭas al vortara ekonomio. Oni povas ĝin anstataŭi per akvum-.

Validas la samo kiel ĉe 2).

4) Internacieco: spatula

Sistematiko: la sufikso ul povas kaŭzi miskomprenon, do estas pli bone elekti la radikon spatel- aŭ spatol-

Precizeco: nek kontraŭas al vorta kaj vortara ekonomio.

Elparoleblo: nenia malavantaĝo.

El la konciza pritrakto oni povas konkludi, ke eblas rapide evoluigi iun terminon ĝis nun ne ekzistantan. Oni serĉu unue la latinan fonton kaj komparu ĝin kun la aktuala internacieco. Kiam ĝi kongruas kun la principoj apliku ĝin.